



estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ por la mondo).

Numero 194

Junio 2002

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto
Stevens Norvell — kompostisto
Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto
Sendu leterojn kaj artikolojn al:

Bob Williamson
329 Poplar Drive
Dartmouth, Nova Scotia
KANADO B2W 4K8
bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:
Reni Porter
71 RidgeValley Road
Halifax, Nova Scotia
KANADO B3P 2E5

Abono por Kanado aŭ Usono estas \$8 (kanadaj) kaj por aliaj landoj estas \$15



LA REGIONA CHIGNECTO-CENTRA HEREDAĴA FOIRO

La 10-an de majo, ĉe la Komunuma Kolegio de Nova Skotio en Truro, okazis la plej granda Regiona Heredaĵa Foiro en Kanado. Partoprenis en tiu Foiro 33 lernejoj de la Chignecto-Centra (Ŝignekto-Centra) Regiono de Lernejoj, kaj pli ol 850 gelernantoj, do estis sufiĉe grava afero por nia regiono. „Historika”, aŭ La Heredaĵa Foiro, estas trans-kanada projekto organizita de grupo de civitanoj kaj korporacioj antaŭ ok jaroj. La celo de tiu projekto estas, ke infanoj de nia lando lernu pri siaj kulturaj originoj per esplorado, konversacio, teknologio ktp, studu la diversajn kulturojn de niaj civitanoj kaj diskonigu tion, kion ili lernis pri siaj originoj al aliaj. La administracio de la Ŝignekto-Centra Regiono de Lernejoj estis antaŭ ses jaroj la unua en Nova Skotio kiu an-

iĝis al tiu ĉi projekto. Nuntempe, ĉiu lerneja regiono en nia provinco membrigas en la projekto, kiu estas celebrado de la kulturoj kaj heredaĵoj de ĉiuj kanadanoj.

Antaŭ ol okazis la Foiro en Truro, multaj lernejoj en Ŝignekto-Centra okazigis siajn proprajn malgrandajn heredaĵajn foirojn kaj poste la lernantoj kies montraĵoj gajnis premiojn rajtis enmeti siajn premiitajn prezentaĵojn en la Regionan Foirojn, kie 65 juĝantoj juĝis ilin. La Leŭtenanto-Guberniestrino de Nova Skotio, Ŝia Moŝto la Honora Myra A. Freeman, kaj ankaŭ la Honora Charles Robert Bronfman (unu el la fondintoj de la Kanada Heredaĵa Programo) kaj lia edzino, ĉeestis por vidi la diversajn montraĵojn kaj paroli kun la junaj prezentantoj.

Krom la belaj montraĵoj, 25 instrukunsidoj pri diversaj aferoj (inkluzive de Esperanto) okazis interne de la foira kadro. Mi gvidis du instrukunsidojn po 45 minutajn, la unuan dum la mateno kaj la duan posttagmeze. Je la matena laborkunsido ĉeestis 15 lernantoj kaj unu instruistino, sed je la posttagmeza ĉeestis 55 lernantoj kune kun alia instruistino. Mi prelegis mallonge pri L. L. Zamenhof kaj lia kreado de nia lingvo. Poste mi instruis la kanton „Ruĝa Pomo”. Preskaŭ ĉiu tre bone lernis kaj kantis tiun kanton, kaj post tio mi instruis kiel kalkuli ĝis mil kaj kelkajn frazojn kiel ekzemple „Saluton”, „Kiel vi fartas?”, „Kiel vi nomiĝas?”, „Ĝis la revido!”, k.a. Mi parolis pri la Pasporta Servo, Esperanto en la interreto, la senpaga poŝta kurso, la U.E.A., la Universalaj Kongresoj, kaj

pri miaj spertoj pri la programo Mondo-Rondo en Upper Rawdon (kie mi loĝas), ktp. Mi portis kelkajn esperantajn librojn por montri kiaj libroj estas haveblaj, kaj ni diskutis tiujn librojn, kiel *Winnie-La-Pu*, *La Sankta Biblio*, *Tinĉjo*, *Dek Demandoj*, *Esperanto en la Moderna Mondo*, k.s. Mi ankaŭ montris fotojn pri diversaj kongresoj kaj aferoj Esperantaj, kaj respondis al la demandoj de la junuloj. Plejparte, la junuloj estis tre scivolemaj kaj pozitivaj pri Esperanto. Fakte, tri lernantoj el la matena kunsido partoprenis la posttagmezan kunsidon, do eble mi faris bonan laboron; mi esperas ke jes. Mi nur estas certa, ke almenaŭ 69 pliaj homoj en nia provinco nun scias pri Esperanto.

— Kim Keeble

AMIKA FILATELISTO RAKONTAS

Antaŭnelonge, mi korespondis kun filatelisto en Picton (Piktono), Ontario, kiun serĉis iu kolektisto de poŝtmarkoj kiu legis artikolon verkita de li. S-ro Alan R. Capon bonkore sendis al mi fotokopiojn de tri el siaj anglalingvaj artikoloj. Temas pri "Doktoro Esperanto" eldonita en la "American Philatelist" (aŭgusto 2000), kaj du artikoloj kiuj aperis ĉi printempe en la "Whig-Standard" tagĵurnalo de Kingston, Ontario. Kvankam S-ro Capon nek korespondas nek parolas esperantlingve dum multaj jaroj, li ankoraŭ havas siajn ekzemplerojn de la Edinburga poŝt-vortaro kaj de la Sankta Biblio. Eble lia kono de Esperanto-tamaj poŝtmarkoj jam iomete eksmodiĝas. Ĉi tiu artikolo estas resumo de la tri artikoloj de S-ro Capon.

— la redaktoro

Mi devas konfesi, ke mi neniam intencis lerni Esperanton, sed mi volis vojaĝi eksterlande kaj la internacia lingvo de D-ro Lazaro Ludoviko Zamenhof donis al mi tiun ŝancon.

Mia tema kolekto de esperantaj poŝtmarkoj, kovertoj, poŝtstampoj kaj kongres-etikedoj komenciĝis je 1949 kiam mi ĉeestis por la unua fojo Internacian Junularan Kongreson en Versailles, Francio kaj ankaŭ la sekvantan jaron en Konstanz, Germanio. Tiam, kiel dekkelkjarulo mi jam estis fervora kolektanto de poŝtmarkoj, kaj mi sopiris povi viziti kelkajn el la ekzotikaj lokoj montritaj sur la poŝtmarkoj, kiujn mi jam kolektis. Sed mi ne povis toleri la elspezojn por tiaj vojaĝoj, eĉ la malfora distanco trans la Angla Kanalo ĝis Francio. Kiam mi lernis pri vojaĝoj antaŭpagotaj de Esperanto-Klubo en la loka junulara klubo de la gepatra urbo

Ipswich, Suffolk, Anglio mi tuj decidis lerni sufiĉe da Esperanto por povi kvalifikiĝi.

La plejparton de mia scipovo pri Esperanto – kaj pri la franca lingvo de la lernejo – mi jam forgesis, sed mi ankoraŭ aldonas al mia poŝtmarkkolekto komencita antaŭ pli ol 50 jaroj. Multaj nacioj jam memorfestis la internacian lingvon inventitan de „Doktoro Esperanto” en la poŝtmarkoj, inkluzive de Brazilo, Pollando, Rusio, Aŭstrio, Bulgario, Jugoslavio, Hungario, Svislando, Belgio kaj Malto. Multaj aliaj nacioj, de Kanado ĝis Nederlando, jam uzis sloganajn poŝtstampojn por rekoni tiujn „Kongresojn de Esperanto”, kiuj jam okazis ekde la unua je 1905. Ekzemple, kanada poŝtstampo de 1975 diras: „SPEAK PARLEZ / ESPERANTO / KANADA KONGRESO / 28-JUNIO-30”. Taksante la nombron de poŝtmarkoj kiuj estis eldonitaj por memorfesti tiujn kongresojn, Esperanto plej populariĝis dum la 1950-aj kaj 1960-aj jaroj. Poste, interesiĝo ŝajne velkis, kvankam belga eldono de 1982 festas la 67-an Universalan Kongreson per poŝtmarko kiu montras la Babel-turon lumigatan de ĉielarko da lumo kiu falas de la Esperanto-stelo kiu suprenpasas.

Antaŭ kelkaj semajnoj mi montris interesan koverton, kaj petis informon pri la sendinto. Tiun koverton trovis por mi raportisto de Toronto, Ian Robertson, kiu jam trovis multajn Esperanto-poŝtmarkojn por mi dum la pasintaj jaroj. Oni enpoŝtigis la koverton de Picton al Toronto je la 15-a de decembro, 1933. Ĝi havas tri kanadajn unucendajn poŝtmarkojn (kiuj montras Reĝon George V) kaj estas adresita „Al Sinjoro Harry Boyd” ĉe adreso en Toronto. En supera angulo de la koverto aperas la vorto „Esperanto” kaj la sendinto nomis sin nur „Esperanto - Picton - Ontario”. Mi skribis, ke mi vere dezirus scii pri tiu „Sinjoro Esperanto”.

Du homoj, S-ino Thompson kaj Pastro Teskey, vokis min por diri ke tiu „Sinjoro Esperanto” estis Hugo Louis Gerisch de North Marysburgh, Ontario. S-ro Gerisch naskiĝis en Saksujo, Germanio en junio 1875 kaj mortis en North Marysburgh je februaro 1950. Li edziĝis al Else Ebert en Auerbach, Germanio en 1902, kaj ili naskis du filinojn. La familio Gerisch proprietas multajn fabrikojn en Germanio, kie ili faris fajnan punkton kaj linaĵon. Post la unua mondmilito, inflacio furiozis en Germanio kaj la familio perdis ĉion. Ili decidis elmigri al Kanado, kaj la bofilo Ernst Roth estis la unua kiu venis en 1929 al Cressy, kie li loĝis ĝis sia morto en 1982. La edzino kaj unua filo de Ernie venis dum la somero de 1930, kaj sekvis la gepatroj en aŭgusto 1930. Else faris unu viziton hejmen al Germanio, sed Hugo neniam revenis.

Hugo Gerisch estis kolektanto de poŝtmarkoj, kaj fervora Esperantisto kaj aktiva subtenanto de la internacia lingvo. Li agadis en esperantaj organizaĵoj ĝis sia morto. La familio ankoraŭ havas ampleksan kolekton de lia korespondaĵo, kaj ili ankoraŭ uzas kun fiero la punkton kaj linaĵon faritan de la familio. Mi dankas al Joanne (Jarvis) Roth pro tio, ke ŝi afable montris al mi la interesan esperantan materialon kaj donis informon pri la familio. Pastro Teskey diris, ke la RCMP (ŝtata polico de Kanado) estis scivolemaj dum la dua mondmilito pri la nombro de fremdlingvaj leteroj kiujn S-ro Gerisch ricevis. Kompreneble, la leteroj estis de esperantistoj kiuj antaŭenigis tiun artifikan lingvon inventitan de D-ro Zamenhof por la uzo de homoj de ĉiuj nacioj.